

# kontakto



N-ro 1  
Volumo 4/1967

# KONTAKTO - REVUO DE TEJO

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo



## KARAJ GELEGANTOJ,

prave vi grumblis kaj grumbas pri ni, la homoj de „kontakto“, pro la paneoj de laŝta tempo. Certe ne estas senkulpigo, tamen eble klarigo, se mi diras al vi, ke simple mankis la kontakto inter la membroj de la teamo, kiu prizorgis la eldonadon de nia revuo. Paradoxse, ĉu ne? Inter la „kontaktuloj“ mankis la kontakto! Sed jen, tia estas la vivo, tiaj estas la homoj.

Nu, ni funde reorganizis la tutan laboron, tiel ke nun la necese bona kontakto estas garantiita. Ni iome koncentris la respondecon, tiel ke nu plu estas tiom da punktoj, kie povas okazi paneoj lamigantaj la tutan aparaton. Kaj ni forte esperas, ke nun vi vere regule ricevos plaĉan revuon.

Ĉi-okaze mi ankaŭ volas danki al vi pro la fideleco, kiun la plimulto montris al ni, malgraŭ ĉio.

Certe vi konstatos ĉe komparo kun la antaŭajnumeroj, ke ni ne nur ŝanĝis la presejon, sed ankaŭ la presan sistemon: ni nun presigas laŭ la konata ofseta metodo, kiu — ĉe sama prezo — donas al ni pli multajn eblecojn por la grafika aranĝo de la revuo. Jen do profito ankaŭ por vi.

Krome vi supozeble ankaŭ ĝojos pri la fakto, ke la dua numero de ĉi tiu jaro eliros jam mallongan tempon post ĉi tiu, tiel ke ni revenos al la normala periodeco.

Fine mi persone pardonon al ĉiuj skribintoj pro eventuala nerespondo, kaŭzita de la neklara situacio de la antaŭaj monatoj. Kaj ankoraŭ peto: Helpu plibonigi la kontakton ankaŭ de via flanko.

## Adresoj

Redakcio: Stefan Maul, Hubertstr. 2a,  
D 625 Limburg/Lahn, Germanio (FR)

Administrejo, al kiu oni sendu ĉiujn abonkotizojn, reklamojn ktp.:  
Kontakto, Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando

Presisto: Drukkerij De Kennemer,  
Wijkerstraat 178, Velsen-Noord,  
post: Beverwijk, Nederlando

## Prezoj

Abono: 8 ndl. guld. = 32 steloj (jara-bono de minimume kvar numeroj);  
2.20 ndl. guld. = 9 steloj (individua numero).

Reklamtarifo: 200 ndl. guld. por tuta paĝo; rabato por esperantistaj entreprenoj.

Bankisto de UEA: Mees & Hope,  
Blaak 10, Rotterdam-1, Nederlando.

Manuskriptojn por Kontakto oni sendu al la redaktoro en du ekzempleroj; ili devas esti klare tajpitaj en korekta esperanto, ĉiuj supersignoj devas aperi laŭ ĝusta formo, se necese enskribitaj permane. Oni skribu sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj granda maldekstra margeno. Manuskriptojn nepetitajn la redaktoro ne devas resendi. Li havas la rajton laŭ sia bontrovo modifi artikolojn. Por la enhavo de la artikoloj respondecas nur la subskribintoj mem, kies opinioj ne nepre akordiĝas kun opinioj aŭ principoj de TEJO kaj de la redakcio.

## ENHAVO

Kanti per brajla skribo ..	3
La viro kun la Oscar-rekordo .....	5
Natanja - Hajfa .....	7
Estu via propra tajlorino	9
Spacveturado pentrita ..	10
La jaroj ne gravas .....	13
PV 281040 neniam eraras	14
Mozaiko .....	5
Brazila karnavala malĝojo en ĝaja kostumo	16



# KANTI PER BRAJLA SKRIBO

## Kanti per brajla skribo

La hodiaŭa junularo plaĉas al ŝi, ĉar ĝi estas honesta kaj helpema — jen konstato de f-ino Anneliese Haas, koncertkantistino, kaj blinda. Ni havis okazon intervjui ĉi tiun nekutiman kaj rimarkindan esperantistinon.

**Kontakto:** F-ino Haas, kiel vi venis al esperanto?

**Haas:** En 1954 mi vizitis feriosemajnon por blinduloj en la Nigra Arbaro (suda Germanio). Tie estis sinjorino Kreuger, kiu nun vivas en Afriko. Ŝi ricevis leterojn el Hispanujo kaj mi demandis ŝin, ĉu ŝi havas amikojn por mi en aliaj landoj, ĉar mi ankaŭ interesigas pri tio. Ŝi respondis ke mi devas lerni esperanton kaj donis al mi adreson en Freiburg, mia loĝloko. Mi vizitis tiun sinjoron kaj ni komencis; plaĉis al mi kaj en marto 1955 li diris: Sinjorino, estas kongreso en Bolonjo; ĉu vi volas iri?

**Kontakto:** Kaj vi iris, ĉu ne?

**Haas:** Jes, mi veturis. Estis nokte, la trajno estis plenplena kaj mi devis stari. Sed baldaŭ venis sinjoro kaj diris: Ĉu vi veturas al la kongreso en Bolonjo? Mi diris jes kaj li donis al mi sian lokon. Estis svedo kaj ni do devis paroli en esperanto.

Ankaŭ en Bolonjo mi parolis — kaj kantis en esperanto kanton de Schubert. Tre plaĉis al la kongresanoj kaj baldaŭ ni havis agrablan rondon.

**Kontakto:** Ne restis via sola kongreso, ĉu ne?

**Haas:** Ne. Poste mi vizitis la kongresojn en Kopenhago, Marsejlo, Majenco, Sofio. Ĝi estis mia plej bela kongreso.

**Kontakto:** Ĉu vi estas denaske blinda?

**Haas:** Ne, mi blindiĝis dum la unua vivojaro kaŭze de kontraŭvariola injekcio.

**Kontakto:** Kiel vi venis al la profesio de kantistino?

**Haas:** Ho, estis iomete aventura afero. Mi ja vizitis blindul-lernejon kaj ĉiam havis la deziron studi kantadon. Sed oni diris, ke tute ne estas profesio por blindulo. Mi devis lerni trikadon. Tiam venis la milito, la lernejo estis fermita, ni devis iri hejmen. Mi laboris en blindulhejmo.

Dum 1940 mi komencis studi orgenludadon. Unu jaron poste mi havis okazon, per mia orgeninstruistino, esti akceptita en la konservatorio por studi kantadon. Mia patro tute kontraŭis, ĉar li ne povis helpi min en tiu afero.

**Kontakto:** Ĉu do estis disputoj?

**Haas:** Ne. Mi simple anoncis min kaj faris la enir-ekzamenon. Mia patro kaj mi havas la samajn dikajn kapojn. Poste li eĉ pagis la kotizojn, dum mi mem pagis la reston per la mono gajnita per duontaga trikado. Estis tre malfacila tempo. En 1944 mi devis ĉesi pro la „totala milito” de Goebbels. Poste mi studis private. Inter-tempe mortis miaj frato kaj patrino. Tamen en 1947 mi faris la ekzamenon kaj komencis



la kantadon. Dum 1954 mi rimarkis ke mia voĉo ne ĝuste funkcias kaj mi iris al Bazelo por denova studado. Poste mi daŭrigis la koncertadon kun paŭzoj.

**Kontakto:** Kion vi kantas ĉefe?

**Haas:** Artkantojn kaj popolkantojn el diversaj landoj, sed ankaŭ operojn kaj operetojn ktp. Hodiaŭ oni devas havi grandan repertuaron. Pasintsemajne mi kantis en la radio modernajn kantojn.

**Kontakto:** Kiel vi lernas viajn kantojn?

**Haas:** Per la bralja skribo. Bedaŭrinde oni ne presas mult-

tajn notojn en la bralja, do mi devas mem skribi ilin. Ofte oni diktas al mi dum la vojaĝo, poste mi lernas hejme. Se eblas, mi studas kvin horojn potage. Krome mi ankaŭ instruas. Nur orgenon mi plu ne ludas.

**Kontakto:** Kaj kiel vi faras ĉe esperantlingvaj kantoj?

**Haas:** Mi ne havas grandan repertuaron, sed ja ekzistas ankaŭ multaj tre malbonaj tradukoj. Preskaŭ ĉiuj tradukintoj ne estas muzik-spertaj.

**Kontakto:** Certe, kantojn oni ne povas traduki kiel poemojn.

**Haas:** Jes, kaj krome la esperantistoj ŝajne ŝatas nur malfalt-nivelajn kantojn, kiujn germane ni nomas „Kitsch”. Per ili ni ne povas propagandi!

**Kontakto:** Ĉu vi estas kontenta pri via profesio nun?

**Haas:** Ja, mi havis tre gravan krizon antaŭ du jaroj. Pianisto kiun mi havis dum longa tempo, havis akcidenton kaj



mi longe ne trovis alian. Nun mi havas multajn bonajn studentojn, sed bedaŭrinde ili ofte ŝanĝas. Sed: mi estas kontenta pri mia profesio.

**Kontakto:** Certe ankaŭ estas bele por vi tiom multe vojaĝi.

**Haas:** Ho jes, mi ĉiam havas agrablajn impresojn, dum la koncertoj konatiĝas kun homoj kaj do havas multajn geamikojn.

**Kontakto:** Ĉu vi ankaŭ jam kantis por diskoj?

**Haas:** Bedaŭrinde ĝis nun ne, sed mi nun volas provi.

**Kontakto:** Kiel vi organizas viajn koncert-vojaĝojn?

**Haas:** Mi havas agentejon, tiel ke mi mem ne devas organizi. Kelkfoje mi mem faras, sed estas tro multe da laboro, neproduktiva laboro.

**Kontakto:** Ĉu vi povas rakonti tipan anekdoton?

**Haas:** Ho, mi scias multajn! Unu mi volas rakonti, kiun kaŭzis mia blindeco. Mi foje kantis en hejmo por endanĝerigitaj knabinoj. Mi kantis ion de Bextuhude. La instrumentistoj estis Bern-anoj, pri kiuj oni diras ke ili estas tre malrapidaj. La ĉelisto staris apud mi kaj diris: Bonvolu turni la foliojn. Mi diris: Bedaŭrinde mi ne povas fari tion. Li tial estis iomete kolera.

Mi kantis legante per la fingroj, ĉar mi ne sciis tute parkere. Poste la ĉelisto senkulpiĝis sin, ĉar li tute ne rimarkis ke mi estas blinda!

**Kontakto:** Ĉu via blindeco kaŭzas al vi multan suferon?

**Haas:** Jes. Tamen plej malgrable estas, ke oni en la gazetoj ĉiam skribas, ke mi estas blinda. Mi tute ne ŝatas tion. Ĉar mi mem estas sufiĉe memstara. Mia patrino estis tre severa al mi. Mi devis mastrumi. Ankaŭ mi faras gimnastikon, kio multe helpas akiri sekurecon en la ekvilibro. Dum miaj lastaj ferioj mi la unuan fojon veturis per biciklo, tandemo, kompreneble, 30 km. Ankaŭ remi mi lernis; tre plaĉas al mi. Ĉi-ĉio estas tre bona por mia memfido.

**Kontakto:** Mi povas imagi, ke plej terure por blindulo estas, se oni montras kompatemon.

**Haas:** Ja, sed bedaŭrinde la blinduloj kulpas mem, ĉar ili ne multe kontaktas vidantojn.

**Kontakto:** Ĉe vi oni tre bone rimarkas tiun kontakton; vi tute ne estas iel amara kaj fermita.

**Haas:** Je., mi tute ne ŝatas esti kun blinduloj. Mi scias ke mi estas blinda, tio sufiĉas. Kiel infano mi ludis nur kun knaboj kaj ĝis hodiaŭ mi ne bone interkompreniĝas kun knabinoj.

**Kontakto:** Feliĉe, ke mi estas „knabo”. . . . Mi multe dankas pro la intervjuo kaj esperas iam ree aŭdi vin kanti dum kongreso.

Stefan Maul

# LA VIRO KUN LA

## OSCAR-REKORDO

Kiu ne konus la nomon Walt Disney! La majstro de la amindaj desegno-filmoj, la kreinto de la bestfiguroj kun la tiel homecaj trajtoj, mortis en sia 65-a vivojaro. Lia vivo estis tiel nekutima kiel liaj filmfi-

devena, la patro kanad-irlandana. Li estis la unua el la kvin infanoj de la familio Disney - malriĉega familio, cetere.

Poste, kiam Walt vizitis la lernejon, baldaŭ montriĝis ke

### PANEO ĈE LA UNUA AFIŜO

El tiu tempo oni scias pri lia unua paneo. Ĉar li havis malfortan voĉon, li pentris afiŝon por propagandi sian gazeton. Ĝi montris leonon, kiu batalis kun tigro, sed lasas sian malamikon ĉar ĝi trovis pli interesan objekton: „Kansas News”. Sed ŝajne la homoj ne komprenis la sencon de lia artverko, ĉar li ne vendis pli multe kaj oni ekz. demandis lin: „Diru, kial ploras la maljuna sinjorino en la aŭtomobilo?” Tiel grandioza do estis la desegna talento de la eta Walt!


Sed tiutempe aperis alia talento: la aktora. Li ne nur imitis homojn, sed ankaŭ eksperimen-

tis antaŭ la spegulo. Eksperimentado ĉiam estis lia ĉefokupo. Li malmuntis ĉion por tute klare koni la objekton; sed kiam li remuntis ĝin - estigis io tute alia.

Ankaŭ lia unua fotilo spertis tion. Cetere li fotografante baldaŭ malkovris, ke la kamero povas optimisme kaj pesimisme kapti ion, depende de la artifikoj kiujn oni aplikas. Tio multe pensigis lin.

### KONTRAŬ ĈIUJ REGULOJ DE L'ARTO

En 1918 la juna soldato Walt direktis ambulanc-aŭton en Francio al la fronto. La aŭton li estis pentrinta per iaj kolorriĉaj karikaturaj, kiuj memoriĝis pri Picasso. Lia soldata sukceso ne estis tiel granda kiel la sukceso de liaj karikaturaj: la kamaradoj entuziasme rekomendis al li fariĝi karikaturodesegnisto. Kaj efektive: reveninte al Ĉikago li enskribiĝis



guroj, lia kariero tiel bunta kiel la aventuroj de Micky-muso, la hundo Pluto, la elefanto Jumbo kaj la anaso Donald Duck...

### GAZET-KNABO


Estis en Ĉikago kaj vintro en la „Windy City” (venta urbo, kiel oni ankaŭ nomas ĝin), kiam naskiĝis (5 dec. 1901) „tipa amerikano” - tipa: la patrino de la knabo estis german-

li ne bone rilatis kun la instruistoj: anstataŭ dediĉi sin fervore al la enuiga kalkulado, li preferis fantazii. Tamen li devis frue lerni kalkuladon - per la mono, kiu konstante mankemis hejme, kaj kiel gazetknabo vendante matene kaj posttagmeze sur la stratoj la „Kansas News”.

en la belarta akademio. Sed la profesoroj ne estis tre entuziasmaj pri li, ĉar aktive li oponis kontraŭ ĉiuj formalaj reguloj de la arto. Li ne longe restis, unuflanke ĉar li opiniis ke la akademio ne povas helpi lin, aliflanke ĉar li bezonis monon por vivi. Li komencis filmi, sed la filmetoj restis sen-sukcesaj. Tiam li proponis sin al reklam-agentejo. „Neatendite oni dungis min!” li rakontis poste.

### SEN SPERTOJ - KUN IDEOJ

Ĉar en tiu metio li ja havis neniam spertojn. Sed li havis ideojn, kiujn la reklamo-ĉefoj same agnoskis kiel lian neordinaran talenton: Ili instigis lin daŭrigi siajn eksperimentojn kun la desegno-filmo, tiam preskaŭ nekonata afero. Kaj jen li trovis la vojon, kiu poste kondukis al la fenomeno distri homojn bonege per tute nova metodo de fantaziaj desegnevivaj figuroj. Kiam ĉa. 1920



de la celuloida paradizo. Tiu paradizo jam situis en Hollywood. Nur la fruktoj ne maturigis...


### LA FENOMENA SUKCESO

La komenca kapitalo estis la „grandioza” sumo de 300 dolaroj! Kun sia frato Roy li startis,

plej sukcesa produktinto en la film-historio. Li posedis propran studejon en Hollywood kaj la mondfama amuz-parkon „Disneyland” en Kalifornio, kiun vizitis jam pli ol 25 milionoj homoj. La filmoj havigis al Disney multajn internaciajn premiojn - entute pli ol 500! - inter ili 8 doktoroj honorkaŭzaj, membreco en la franca honora legio kaj 50 „Oscar” (plej alta usona filmpremio), tio estas







absoluta rekordo. Cetere, li ja ne nur produktis desegno-filmojn, sed preskaŭ same famiĝis pro diversaj kultur-filmoj. Oni eble povas konsenti al la eminenta angla karikaturisto David Low, kiu asertis: „Walt Disney estas la plej grava fenomeno de la grafika arto post Leonardo da Vinci!”



sed nur malrapide ili antaŭenmarŝis. Pli boniĝis nur, kiam Disney ĉesis la produktadon de reklamfilmetoj kaj tute dediĉis sin al amuzaj filmoj. La kuniklon Oswald sekvis Micky, la muso, kiu origine nomiĝu Mortimer (sed ricevis sian nomon de la edzino de l' kreinto). Kaj jen: la muso trafis la centron! Tiu Micky-muso antaŭ 40 jaroj ŝtorme konkeris ĉies korojn. Kaj ĝi ebligis tiun krutan karieron de la viro, kiu ĉe sia vivofino ne nur estis milionulo kaj famega viro, sed ankaŭ la

naskiĝis la kuniklo „Oswald”, ĝi kvazaŭ estis la Adamo de la Disney-a bestaro en la ĝardeno



# NATANJA- HAJFA

Pro la milito en Meza Oriento ne povis okazi la UK kaj TEJO-kongreso en Israelo — bedaŭrinde, ĉar la lando vere estas interesa, la movado fortiĝanta. Ni esperas, en unu el la venontaj numeroj prezenti al vi ilustritan raporton pri Israelo, ĉar la redaktoro de „kontakto” dum septembro ĉijara vojaĝas tra la lando. Ĉi-sekve artikolo, kiu atingis nin antaŭ la milito.


30 km norde de Tel Aviv troviĝas la urbo **Natanja**, somerrestadejo por tiuj, kiuj ŝatas marbordon kaj belan plaĝon. Natanja estas ĉirkaŭata per multaj fruktĝardenoj. En la urbo mem floras diamant-industrio.

En Natanja origine okazis la ĉijara kongreso de **TEJO**. La loko estis elektita ne nur pro sia bela ĉirkaŭaĵo, sed ankaŭ pro la relative granda nombro de junaj esperantistoj: lastjare esperantistiĝis 140 gejunuloj kaj

la unuan fojon en Israelo oni instruis esperanton devige en tri diversaj mezlernejoj.

En distanco de 20 km de Natanja estas la industria urbo **Ĥedera**, proksime de ĝi (5 km) troviĝas la grandiozaj restaĵoj de la antikva urbo **Cesarea**, fondita de reĝo Hordus (Herodes) 10 a. Kr. La urbo estas tute kovrita per sablo kaj neniu povis imagi, kia historia trezoro tie estas kaŝita.

Nur antaŭ 10 jaroj oni elfosis grandan amfiteatron en tiel bona stato, ke hodiaŭ oni aranĝas





tie koncertojn. Oni elfosis restaĵojn de domoj, temploj, trovis skulptaĵojn. Elfositaj estas ankaŭ grandegaj defendmuroj de krucmilitista urbo starinta sur sama loko.

En la proksimeco alta akvokondukilo, kiu el distanco de 25 km provizis malnovan Cesareon per akvo.

En proksima kibuco estas malgranda muzeo, kie oni povas vidi ĉiujn artaĵojn trovitajn en Cesarea. Kvankam Israelo ne havas vulkanojn, la vento imitigas ĝian laboron, superŝutante per la sablo urbon, kiel iam Vesuvo superŝutis per cindro urbon Pompejon. La sablo konsareon per akvo.





servis dum mil jaroj Cesareon kaj ni povas ĝui rigardante antikvaĵojn.


Proksime de Cesarea estas moderna golfludejo. 100 km norde de Tel Aviv estas la havena urbo **Hajfa**. Ĝi estas konstruita sur la deklivoj de biblia monto Karmel, kie iam la granda profeto Elia vivis kaj predikis. Tie estas granda groto kie li loĝis, nuntempe sankta loko por kris-

tanoj, mahometanoj kaj judoj kune.

Monto Karmel verda, kun blankaj domoj apud la blua maro en brila suno faras grandan impreson, la pejzaĝo de Hajfa estas neforgesebla. Hajfa estas la ĉefa pordego de Israelo kaj ĉiujare trapasas ĝin milionoj da tunoj de diversaj varoj. Politekniko en Hajfa troviĝas en modernaj domoj bele konstruitaj

tre alte sur Karmel. Dum la someraj monatoj, kiam la studentoj forlasas ĝin, la studenta domo estas forluata kiel somera ripozejo pro sia bela situo kaj pro la pli milda klimato sur la deklivoj. Hajfa estas ankaŭ la centro de la israela industrio kaj ĝis nun estas konata kiel laborista urbo. Ĝi havas 180.000 loĝantojn.

d-ro H. Mašler



**POR NIAJ KNABINOJ**

Estu  
via  
propra  
tajlorino

Ŝika, facile farebla kaj tre varie uzebla estas ĉiu tiu bolero-kostumeto. La partoj estas apartigeblaj: la jupo estas universaleta vestaĵo, portebla ankaŭ kun pulovero (kun rondigitaj ripoj) aŭ blanka punto-bluzo; la jaketo bonege harmonias ankaŭ kun alikolora jupo farita laŭ la sama tajlorplano.

Oni bezonas 3 m de 90 cm larĝa (aŭ 1,85 m de 140 cm larĝa) ŝtofo; 1,70 m de 140 cm larĝa tafto; 240 cm longan velur-rubandon (3 cm larĝan).

Ĉe nia tajlor-plano (por la grandeco 42) unu kvadrat-linio korespondas al 10 cm. La refaldo-borderon vi devas aldoni. Oni tondas la jaketajn partojn el ŝtofo kaj tafto. Kunigante ŝtofon kaj tafton atentu, ke ili ĉe kolumo kaj frontflankaj randoj restu nefermitaj, ĉar tiuj lokoj, same kiel la manikoj, estu kovritaj per la velura rubando.

Ĉe la kolumanguloj oni alkudras hoketon kaj hokingon kaj kovras ilin per velura banto aŭ simple per du rubandoj, kiujn poste oni vere nodos bante. Ĉe la jupo oni agas simile Ĉe la frontpartoj oni povas fari taliajn fendojn kaj fermi ilin, aŭ lasi faldojn nefermitajn, nur supre kunkudritajn. Dorse oni unue fermkudras la fendojn, poste ĉiujn faldojn (ŝtofon kaj tafton komune). La randojn denove fortikigas per 3 cm zonstrubando. Fine oni kudras la butonojn sur la (poŝ-)klapoj kaj la jupo.


Multan plezuron ĉe la tajlora laboro — kaj ĉefe ĉe la portado!


# SPACVETURADO

*pentrita*




Antaŭ kelka tempo en Vaŝingtono oni malfermis interesan ekspozicion. Ĝi ampleksis 70 pentraĵojn kaj grafikajojn de 14 konataj usonaj artistoj, kies temo estas tiel moderna kiel nur eblas: spacveturado. El tiuj bildoj ni elektis tri por doni al vi imagon, kvankam kompreneble la manko de la koloroj permesas nur magran impreson. Sed ankaŭ nigrablankaj la bildoj ŝajnas al ni sufiĉe interesaj por nia celo. Precipe domaĝe estas la manko de koloro ĉe la akvarelo de Paul





Sample, ĉar ĝi fascinas ĝuste kun ĝiaj — ankoraŭ — nekuti- raketo, la inferan fajron tuj per siaj koloroj. La bildo mon- maj formoj. post la „countdown” kun la gi- tras „spacveturadan stacion” Paul Calle pentris la starton de gantaj fumnuboj.



12

Kaj Mitchell Jamieson ŝajnas glori la homon, la triumfantan kosmonaŭton kiu revenante el la universo ne tuj al kutimiĝas

al la malgranda tero. Ni volonte ekscius viajn opiniojn pri ĉi tiuj bildoj kaj instigas vin skribi al ni!

# LA JAROJ NE GRAVAS



Kiam mi estis ankoraŭ lerne-  
jano, aĝo decidis ĉion. La pli  
aĝaj knaboj superece rigardis  
la pli junajn; la supraj klasoj  
estis iaj paradizoj kie la inte-  
lektoj subite burĝonis sub la  
benaj radioj de ĉiopovo; anoj  
de la plej supra klaso estis dioj.

La ideoj de tiuj lernejoj tagoj  
persistas tra la tuta vivo. Jam  
nun, kiam mi pli bone pasigus  
mian tempon je planado pri la  
estonteco, mi komencas mediti  
pri la **grandeco** de mia aĝo,  
kvazaŭ mia vivo estas malantaŭ  
mi anstataŭ plejparte en la  
estonteco. Rigardante la lerne-  
janojn ĉe la apuda aŭtobushaltejo  
mi apenaŭ povas kredi ke  
antaŭ nur kelkaj jaroj mi nur  
sukcesis nodi mian kravaton  
kaj ke daŭre mi havis proble-  
mojn pri mia nazo.

Kion entute signifas, ekzemple,  
kiam knabino, en ĉi tiu epoko  
de libera agado kaj egalaj rajtoj  
decidas ke iu viro estas tro juna  
por ŝi? Se, ni diru, Feliĉa ne  
pretas pasigi multan tempon  
kun Emilo ĉar li ankoraŭ pasig-  
gas horojn notante registronu-  
merojn de aŭtoj kaj fervore  
ludas futbalon en la strato ĉiu-  
sabate, dum ŝi jam unu jaron  
kaj duonon pagis la propran lu-  
pagon kaj havas tri nevojn,  
do ŝi sendube havas kelkajn  
pravajn argumentojn. Sed se,  
aliflanke, ŝi tute principe **ne**  
rendevuos kun iu ajn junulo pli  
juna ol ŝi, tio estas neracia.  
Temas pri simpla tabuo. Sub-  
traho de lia aĝo de la ŝia kaj  
posta ŝokoplena rigardado de la  
restanta diferenco estas ordina-  
ra vulgara superstiĉo. Se li  
havis sufiĉan lerton kaj allogon  
malekvilibrigi ŝin dum tri se-  
majnoj, do li sufiĉe aĝas.  
Klara, tamen, pasigas horojn  
da maltrankvilo meditante pri  
tio kion normale faras junuli-

noj de ŝia aĝo kaj kion ŝi evi-  
dente ne faras. Kaj la fina efiko  
estas ke ŝi tute simple faras  
nenion. Hieraŭ ŝi festis sian  
26-an naskiĝtagon en kompleta  
izolo. Fakte, ŝi trinkis duonta-  
son da supo en la subtegmento  
kaj forbrulis ĉiujn salutkartojn  
kiujn ŝi ricevis.

Ŝi pasigis la tagon murmurante  
al si ke kvar kvinonoj de ŝiaj  
ekslernejaj amikinoj estas edzi-  
niĝintaj, ke la meza salajro de  
iliaj edzoj estas tiom kaj tiom,  
ke ili havas unu aŭ du infanojn,  
razenon antaŭ la domo kaj  
dombeston — hundon aŭ katon;  
dum ŝi havas iom eluzitan ates-  
tilon pri balotarajto kaj perso-  
nan universon kiu funkcias sur-  
baze de ciferoj kaj estas direk-  
tata ĉiam malantaŭen. **Ŝi povus**  
krompreneble direkti sin an-  
taŭen, aŭ almenaŭ rigardi ĉir-  
kaŭ si iomete. Finfine, ja eblas  
venki procentaĵojn. Sed Klara  
sub tiuj cirkonstancoj certe  
preferus turmenti sin pri la  
fakto ke ŝi ne funkcias laŭ sta-  
tistikoj kiel faras ĉiuj ŝiaj ami-  
kinoj.

Sed dum Klara rifuzas fronti la  
estontecon, Serena simple sidas  
tremanta.

La trideka jaro alproksimiĝas,  
ŝi krias. Hororo. Hororo. Ho-  
roro. La trideka jaro estas kiam  
la kolo komencas aspekti kiel la  
surfaco de pastinako, kaj la  
junaj servistoj ĉe la apuda ven-  
dejo nu plu nomas vin 'fraŭlino'  
kaj okulumas vin. Kaj la sola  
knabo kiu parolas kun vi estas  
Miĉjo. Tridek estas tri kvaronoj  
de kvardek. Kaj kvardek estas  
duono de okdek.

Mi aldonu ke Serena ek de la  
deknaŭa jaro plendis pri sia  
aĝo.

Kelkaj homoj nur scias bleki  
pri perdita gloro. Ili ne kom-  
prenas ke bono povas pliboniĝi.  
Ŝajnas al mi ke ĉiuj karulinoj

iom torde traktas pri aĝo.  
Feliĉa superecas, Klara rigar-  
das malantaŭen kaj Dio scias  
kion faras la kompatinda Sere-  
na. Sed per iomete da pensado  
vi konstato ke estas io bona  
pri ĉiu aĝo — kaj **ne teorie**  
bona, sed **fakte** bona. Ĉar tio  
estas ne teoria, sed praktika de-  
mando. Unu knabino diris al mi  
ke ŝi plej ŝatas sian nunan  
22-an jaron ĉar homoj komen-  
cis trakti ŝin serioza. Alia kna-  
bino preferas esti 19-jara ĉar  
neniu traktas ŝin serioza.

Se vi deziras mian opinion (kaj  
vi ricevos ĝin ĉiuokaze, ĉar mi  
havas la skribmaŝinon), mi kre-

das ke estus plej bone se ni  
tute ne scius la propran aĝon.  
Tiam ni komencus agi normale,  
kaj pritrakti aliajn homojn nor-  
male. Kiam oni scias la propran  
aĝon, oni komencas demandi  
sin kion oni je tiu aĝo devus  
fari. Alivorte dirite, oni komen-  
cas mezuri la propran persone-  
con laŭ iu ekstera mezurilo.  
Kial superflue nesinceri?

Estas unu maniero malrapidigi  
tempon. Tio estas malfeliĉi. Se  
oni sidas en konstanta dentista  
seĝo, la vivo ja terure malra-  
pide pasas. Kaj oni neniel el-  
profitos ĝin.

Mi konas kontrabasan ludiston  
kiu subite konstatis ke li volas  
fariĝi psikiatro. Estas diplomiĝo,  
li pensis, suprenplukante la A-  
kordon kaj descendante la E-  
kordon, kaj medicina kolegio,  
kaj hospitala trejnado kaj tiel  
plu, kaj finfine mi havos kvar-  
dek jarojn antaŭ ol mi komen-  
cos gajni bonan salajron.

Do, li rezignis pri la ideo.  
Kaj nun li havas kvardek  
jarojn ĉiuokaze.

JUNULO



# MOZAIKO

## Citaĵoj

Dekfoje ripetita ĝi plaĉos.

Horatius

Sub la armiloj silentas la leĝoj.

Cicero

La homoj volonte kredas kion ili deziras.

Caesar

Hodiaŭ multaj homoj aĉetas per la mono, kiun ili ne havas, varojn, kiujn ili ne bezonas, por imponi al homoj, kiujn ili ne ŝatas. Walter Wintchell

## EINSTEIN

Profesoro Einstein en la ĉiutaga vivo estis tre distrita.

Foje li lasis siajn okulvitrojn en la tramo. Lernantino rapide prenis kaj portis ilin al li. „Dankon, infano”, diris la profesoro. „Vi estas tre atentema. Kiel vi nomiĝas?”

„Clara Einstein, paĉjo-” diris la knabino.

## PRESERAROJ

Suomia gazeto skribis: „Ĉar ekzistas legantoj, kiuj legas gazeton pro la preseraroj, ni volas komplezi ankaŭ ilin. Ili trovu ĉe ni, kion ili serĉas!”



PS: En nia gazeto ĉiam estas aŭtentikaj preseraroj.

## LAŬSTILA

La teatrejo prezentis la unuan fojon verkon de juna aŭtoro, krimalkomedion. La postan matenon oni povis legi en la ĵurnalo: „Ĉio estis laŭstila kaj montris grandajn fakajn sciojn. Eĉ tio, kion la ŝtelistoj parolis, estis ŝtelita.”

## ĈU VI SCIAS

ke estas granda eraro opinii, ke nigra koloro sur blanka papero estas la kolor-kombino, kiu pleje faciligas legadon? Pro legebleco nigra koloro sur flava papero estas en la unua pozicio, sekvas verda sur blanka. Nigra sur blanka estas nur la kvina pozicio en tiu skalo.

ke petrolo estis konata jam en la antikvo? Kie ĝi aperis el la tero surface, kiel ekz. en Malgranda Azio, oni uzis ĝin ofte kiel medikamenton.

ke en Budapeŝto ekzistas ligno-muzeo? Pli ol 1004 diversaj lignospecoj estas tie montrataj, krome ĉio, kio apartenas al la unuopaj specoj (do folioj, ŝelo ktp.).

ke en Japanio troviĝas fiŝ-hospitalo?



La doktoroj kuracas tie fiŝojn, delfenojn, testudojn ktp., kiuj malsaniĝas en la Toba-akvario, al kiu apartenas la fiŝ-hospitalo. Sed oni ankaŭ kuracas bestojn, kiujn alportas privatuloj. ke de la jaro 1965 ekzistas infan-ope-rejo en Moskvo? Dum pli longa tempo jam en la soveta ĉefurbo oni havas propran infanteatrejon.

## EL FRANCAJ LERNEJ-KAJEROJ.

La unuaj homoj vivis en grotaj, la duaj sur la apuda flanko. La tri grandaj epokoj de la homeco estis la ŝtonepoko, la bronzepoko kaj la pensiepoko.


Dum tiu tempo niaj prauloj estis vestitaj kiel mizeraj bestoj. Poste ili vi-



vis en kabanoj. Ili ne havis vestojn, ne ĉemizon, nur truan por ellasi la fumon. Krome ili disponis, por fondi familion, nur pri tre primitiva ilaro.



Romo estis fondita per Romulus kaj Cumulus, du infanoj elkovitaj per lupino. La romanoj devis fari multajn militojn, ĝis Italio fariĝis duoninsulo. Unue kontraŭ la Sabinoj, kies virinojn ili kidnapis.



Pli poste la romanoj anstataŭigis la soldatojn per anseroj. Ili manĝegis pli malmulte kaj kriis des pli laŭte.



Jeanne d'Arc, la virgulino de Orleans, naskiĝis hejme. Ŝi aŭdis voĉojn, kiuj vokis ŝin fari sian militservon.

En Chinon ŝi ekkonis la reĝon, ĉar jam antaŭe ŝi estis vidinta lin sur foto. Unue li traktis ŝin kiel frenezulinon. Sed ŝi ne cedis. Tiam li donis virojn al ŝi.

En Compiègne ŝi liberigis Reims de la malamikoj. En la jaro 1429 ŝi konkeris la urbon Orleans. Virgulino ŝi fariĝis nur multe pli poste.

La angloj kaptis ŝin, sidigis ŝin sur gigantan ŝtiparon kaj bruligis ŝin. Ŝi mortis vivkorpe. La francoj estis malleperaj. Nun ili ne plu havis virgulinon.

## ELDIROJ DE PROFESORO

Ateno pereis pro la frazo: Ordo devas esti.

Ĉu Homero vivis, ni ne scias. Ke li estis blinda, estas konate.

La apostoloj parolis pri la monogamio tiel memkompreneble, ke ili tute ne menciis ĝin.

La instruisto ĉiam pravas, ankaŭ se li malpravas.

Ne kontraŭdiru al tio, kion mi neniam diris al vi.

Ekzistas multaj, kiuj ne parolas, se ili silentu, kaj aliaj, kiuj ne demandas, se ili respondis.

Johann Georg August Galletti



## Samba

Al personoj, kiuj surface konas aŭ kontaktis kun la brazila muziko, ŝajnas, ke la brazilanoj "faras el ĉio sambon": ĉu ĝojo regas, ĉu tristo dominas, el ĉio sambo rezultas; jen stranga fenomeno por nespertaj okuloj.

Kaj kiam la brazilanoj ridas, kaj kiam ploras, ili kantas, verkas, kaj dancas sambon. Tamen okazas, ke sambo karakteriĝas per tiu verva ritmo, jen pli laŭta, jen pli milda, sed ĉiam tre distingebla, ĉar ĝi estas ĉefa elemento (se oni konsideras, ke sambo estas dancmuziko); do fremdulojn alportas ĉi tiu kvalito al la konkludo (misa), ke la brazila muziko estas ĉiam gaja.

Jen troviĝas du bazaj eraroj: 1) la ritmo ne signifas gajecon, ĉar ofte la melodio — la vera sentesprimento — estas malgaja; 2) sambo konsistigas ne la tutan muzikon de Brazilo, sed nur gravan parton. Do kiel oni povas klarigi la fakton, ke, kvankam multfoje konstatiĝas nekaŝebla tristo en la melodio, tamen oni dancas same verve? Ni trovas paralelecon inter Hungarlando kaj Brazilo: ĉiu, kiu jam aŭdis ĉardaŝon, rimarkis, ke, malgraŭ plej grandaj rapidc kaj pasio de tiu ĉi dancmuziko, la melodio, en larĝa plimulto de l' kazoj, estas malĝoja. Ĉu vi scias kial? Ĉar, simple ne **devas** ekzisti rilato inter la melodio kaj ritmo, nur **povas** okazi tio.

Do nun ekzameni la kontraŭan flankon de tiu ĉiu objekto, nome, la gajajn muzikojn. (Restas implicata ke ni jam ekskluzivis tiajn muzikojn, kiaj donas malveran impreson pri gajo, kaŭze de la ritmo.) Por ke ni trafu la nodon de l'afero, ni devas unue vidi, pri kiu

# BRAZILA


# KARNAVALO



# MALĜOJO EN GAJA KOSTUMO

speco de gajo temas. Ĉar ekzistas du bazaj specoj de gajo: 1) la "vera", aŭtentika esprimo de interna ĝojo; 2) la "malvera", defendo de la psiko kontraŭ malĝojo sentata. Muzike, la dua speco diferencas de l' unua per tio, ke ĝi estas „forcita”, ĝenerale pli brua kaj bombasta. Kiel ni konstatis en la antaŭa paragrafo, la muziko brazila povas esti ofte malgaja. Sed troviĝas ankaŭ gaja; tiu ĉi gajo estas jen de l' unua speco, jen de la dua. Mi intencas analizi nur la duan nome, la "malveran".

*Samba*



Nun ni alvenas al la celo de tiu ĉi artikolo: ekzameni la precipan manifestiĝon de la fenomeno "malvera gajo" en Brazilo, kiu estas ĝuste la karnavalo. En la karnavalon ĵetiĝas angoro kaj tristo, super ĉio mizero. Ne estas koincido, ke la "karnavalo-stabon" konsistigas la malsupraj klasoj de l' brazila socio. Evidente, aliaj faktoroj kontribuas por la pluekzistado de la karnavalo: tradicio, turisma alloga, publikamuzo k.a. Sed la ĉefa kaŭzo "iniciatinta" ĉi tiur faman feston estas la ĵus menciita.

Tamen, "karnavalo" signifas ankaŭ "spektaklo". La lukso kaj pompo, la bruo kaj dancado, ĉio kuniĝas por fari unikajn bildojn, pruvo pri la influo de afrikaj kulturoj sur la brazilan. Polifonio, polikromio, karkofonio, jen kelke da elementoj vivigantaj la feston.

En aliaj urboj la karnavalo ankaŭ forte impresas, sed ĝia pleja brilo sin montras en Rio de Janeiro, la oficiale eksa sed efektive ankoraŭa ĉefurbo de Brazilo. Tial mi ĝin elektis; baze de ĝi mi provos liveri kelkajn aspektojn, kiuj, ĉiakaze, estos nur skizoj senkoloraj.

Sabato preskaŭ nenion prezentas ĝis posttagmeze, kiam ekaperas grade la unuaj grupoj, unue timide, tuj pli kuraĝe, kantante kaj dancante, kun la strebo sin vesti en plej groteskaj kostumoj. Oni eblas senti kvazaŭ febron, kiu lante enŝvebas, kaj ĉirkaŭprenas la urbon. Je la sepa vespere (kun minimume duhora malfruo, evidente) oficiale malfermiĝas la karnavalo, pere de l' parado de la frevo-grupoj. "Frevo" estas dancmuziko kun ritmo rapida; ĝia koreografio estas same malfacila kiel de iuj rusaj dancaĵoj.

Dimanĉe realiĝas la vere granda spektaklo: la parado de la sambo-grupoj, kies nombro da membroj kelkfoje superpasas po tri mil! Ĉiu sambogrupa konsistas el plure da sekcioj, kiel, ekzemple, la orkestro, la ritmistoj, la standardo-portistino, la dancistoj, la ĉaroj kun gigantaj figuroj, kiuj simbolas,

ĝenerale, parton de l' brazila historio k.t.p. k.t.p. La parado (komencita malakurate, por nerompi la tradicion) daŭras, kelkfoje, ĝis la tagmezo de lundo!

Sed preskaŭ neniu spektanto foriras; preskaŭ ĉiuj restas, aplaudas, kaj atendas ĝis la fino.

Lunde okazas la parado de la blokoj kaj ranŝo-grupoj. „Blok-o" estas ĉiaspeca karnavala grupo, ĝenerale pli eta ol samba. Meritas rimarkon la bloko "Mi Sola", el ununura persono,

kiu jam paradas de multe da jaroj. "Ranŝo" estas muziko kun ritmo simila al la marŝa, tamen pli lanta. Ekzistas du apartaj blokoj, kiuj paradas en la Cindra Merkredo. La unuan ĉiujare la polico dispelas. La duan la Rio-de-Janejra humoro nomas "Kion mi diros hejme?", konsistantan el homoj pro ekscesa

karnavalemo arestitaj; do la tago de l' parado koincidas ĝuste kun la tago de la liberigo... Ankaŭ lunde eventas la balo de Teatro Municipal, fama pro sia kostumkonkurso, en kiu lukso kaj belo kuniĝas por admirigi (kaj enviigi) multajn.

En mardo spektaklas la "grandaj kluboj", grupoj de ĉaroj kun maletegaj figuroj de rava bunteco. Ĉe la proksimiĝo de l' noktomezo oni komencas amase krii surstrate: "Nur hodiaŭ, morgaŭ jam ne!" Malrapide falas la kurtenoj antaŭ la sceno. Kaj sunleviĝe restas sole la urb-ornamaĵoj, kelke da kostumo-stumpoj kaj trolaculoj, kiuj preferis dormi sur trotuare mem.

Nun oni devas atendi ĝis la venonta jaro...

Francisco Stefano Wechsler



duo espera kantas dylan kaj seeger en esperanto

Ĵus aperis nova longedatra 30cm-a stereo-disko (ankaŭ ludebla monoe) kun kantoj el plumo kaj repertuaro de bob dylan kaj pete seeger en vere brila esperanto-traduko kun orkestra kaj korusa akompano en belega muzikaranĝo, kantataj de la duo espera: gefratoj hanny kaj adri, konataj de radio- kaj tv-stacioj beneluksaj. Ĝia nomo: "jen nia mondo"; ĝia numero: iramac-relax 7002



la sukceso de la roterdamaj kongresoj



menu ĝin rapide: se vi havas poŝt-ĉekkonton: per transpago de 18,15 ned.gld. (16,50+ afr.) al nederlanda pĉk 686965 por "kasisto intern., zaandam". se vi ne havas pĉk, simple menu per libroservo, menciante la nomon kaj numeron de la disko. nun.



Unua Internacia Kongreso de Esperanto en NOVEMBRO 1965

## Perantoj de KONTAKTO

**Argentino:** s-ro J. C. Milkuschutz, Sarmiento 3298, OLIVOS (330 pesoj)  
**Aŭstralio:** s-ro K. G. Linton, 11 Poplar St., South Caulfield S.E. 8, MELBOURNE, Vic.  
**Aŭstrio:** s-ro F. W. Rentmeister, A 1150 WIEN XV/101, Kauergasse 1/1 St. 2, Stg. 15 (58,— Sch.)  
**Belgio:** s-ro François Schellekens, Frans Hensstraat 44 c-10-3, ANTWERPEN (115 b.fr.)  
**Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, Praça da República 54-II, RIO DE JANEIRO (3400 kruz.)  
**Britujo:** Brita Esperantista Asocio, 140 Holland Park Ave., LONDON, W.11 (16/— ŝil.)  
**Bulgario:** s-ro Simeon Simeonov, G. Genov 22, SOFIA-C (2,— lv.)  
**Ĉeĥoslovakio:** s-ro Egon Moravec, U družstva Ideál 11, PRAHA 4-Pankrác (32 Kés)  
**Danlando:** s-ro Søren Andresen, Friggsvej 10 st.tv., FREDERICIA (15,50 d.kr.)  
**Finlando:** s-ro Joel Vilkki, SOMERO (7,10 f.mk.)  
**Francio:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 34 rue de Chabrol, PARIS 10 (11 NF)

**Germanio (FRG):** s-ro Reinhard Heupenthal, 6603 SULZBACH 1, Am Bahndamm 12 (8,90 g.mk.)  
**Germanio (GLR):** s-ro Hans Eichhorn, 83 PIRNA, Großsedlitzer Str. 54 (8,90 MDN)  
**Greklando:** s-ro S. Sakellaropoulos, Agias Paraskevis 30, Kato Patissia, ATHINE (66 dr)  
**Hispanio:** s-ro R. Molera, Sta Joaquina de Vedruna 13, MOYA, Barcelona (135 pes.)  
**Hungario:** Hungara Esperanto-Junularo, Kenyérmező u. 6, BUDAPEST VIII (52,— ft.)  
**Irlando:** s-ro J. Addis, Kingstone House, Ballinteer, DUBLIN 14 (16/— ŝil.)  
**Islando:** Federacio de Islandaj Esperantistoj, Pósthólf 1081, REYKJAVIK (93,— i.kr.)  
**Israelo:** s-ro J. Ben Alter, P.O.B. 379, PETAH TIKVA (6,70 isr.pd)  
**Italio:** Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (1400 lr.)  
**Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Hongo 2-2-14, Bunkyo-ku, TOKIO (800 enoj)  
**Jugoslavio:** s-ino Emilja Lapenna, Nova Ves 32/III, ZAGREB (2000 din.)

**Kanado:** s-ro W. D. B. Hackett, 362 Soudan Ave., TORONTO 7, Ont. (2,40 dol.)  
**Kongo:** Konga Esperanto-Instituto, B.P. 7579, LÉOPOLDVILLE  
**Koreo Suda:** s-ro Taekeng Kim, 104-43 An Am-dong, SEOUL  
**Madagaskaro:** s-ro Eugène Raveloson, B.P. 1678, TANARIVE (300 f.mg.)  
**Maroko:** s-ro René Cagnon, 19 rue Pierre Parent, RABAT (11 DH)  
**Meksikio:** s-ro F. Azorin, Str. Gualdalkuivir 41-E, MEXICO 5 D.F. (28,— pesoj)  
**Nederlando:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, Nieuwe Binnenweg 176, ROTTERDAM-2 (8,— gld.)  
**Norvegio:** s-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn 118a, OSLO-Bryn (16,— n.kr.)  
**Novzelando:** Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, P.O. Box 181, UPPER HUTT (16/— ŝil.)  
**Pollando:** s-ro Marek W. Pietrzak, ul. Francuska 5a/3, WARSZAWA (55 zl.)  
**Portugaliao:** s-ro José Antunes, Rua dos Fanqueiros 106, 4 dto., LISBOA (4,— esk.)  
**Rumanio:** s-ro Florin Carages, Popa Petre 28, BUCURESTI-9 (32 lejoj)  
**Sovetunio:** s-ro A. E. Gončarov, p.k. 11, BARNAUL 99 (2,50 rbl.)  
**Sudafrika:** s-ro Colin Beckford, P.O. Box 10516, JOHANNESBURG (1,60 rnd.)  
**Svedio:** Sveda Esperanto-Federacio, Specialkonto, MALMÖ (11,50 s.kr.)  
**Svislando:** s-ro Otto Walder, Waldmannstr. 10, 8590 ROMANS-HORN (9,70 s.fr.)  
**Urugvajo:** d-ro R. Zeballos Morales, FRAY MARCOS (Florida) (50,— pesoj)  
**Usono:** s-ro D. E. Parrish, 328 West 46 St., LOS ANGELES, Calif. 90037 (2,25 dol.)  
**Venezuelo:** s-ro L. Moulines, Apartado del Este 4845e CARACAS (10,— bol.)



# KONTAKTO

LA REVUO POR BEBOJ KAJ AVINOJ

LA INTERESA REVUO

POR LA JUNULARO



KOLEKTU LA ELDONSERION

# ORIENTO-OKCIDENTO

eldonatan sub aŭspicio de UEA

## LUKSAJ VOLUMOJ DAŬRE VALORAJ

1. **MALSATA STONO**, sep emociaj rakontoj de la plej glora hinda aŭtoro de modernaj tempoj, Rabindranath Thakur (Tagore). Vive reflektas la socian kaj naturan fonon de Hindujo. El la bengala originalo tradukis L. Sinha. 127 p., 8 ilustraĵoj. Bind. 11,50 gld.; broŝ. 8,50 gld.
2. **RAKONTOJ DE OOGAI**, kvar diverskarakteraj verkoj de la elstara japana novelisto Mori oogai. Koncizaj noveloj, densaj je dramaj okazaĵoj. Inkluzivas la filmitan "Sansyō-dayū". Kvar malsamaj tradukintoj. 116 p., 2 bildoj. Tolbind. 10,25 gld.
3. **LA NAŬZO**, eksterordinara romano de la franca filozofo-romanisto Jean-Paul Sartre. Intima taglibro de homo, kiu esplorvagas en sia konscio. Bonega traduko de Roger Bernard. Eldono de UEA. 212 p., kun frontispico. Broŝ. 11,70 gld.
4. **KALEVALA**, la grandioza nacia eposo de la finna popolo, plena je mitaj heroaĵoj, praa folkloro, majesta poezio, eĉ humuro. Monumenta, 30-jara traduko de J. E. Leppäkoski, "riĉa rezulto de admirinda fortostreĉo, plena rego super la lingvo, majstra maniero de formo" (Kalocsay). 368 p., 100 vinjetoj. Bind. 25,— gld.
5. **MARTÍN FIERRO**, iasence la nacia eposo de Argentino, liberritma verko de José Hernández. Vigla, facile fluanta stilo gustanta je la senbrida vivo de la gaŭĉo. Rim-versa traduko de Ernesto Sonnenfeld. 289 p., ĉirkaŭ 1200 strofoj, ilustrita. Bind. 14,40 gld.
6. **REĜO LEAR**, unu el la ĉefdramoj de Shakespeare. Brile "Shakespeare-a" versa traduko de la majstro de Esperanta poezio. K. Kalocsay, "decida antaŭpaŝo en la kampo de la viva dramo" (Foote). Emocia enhavo plus ĝue legebla lingvaĵo. Eldono de UEA. 160 p. Bind. 16,50 gld.; broŝ. 14,— gld.
7. **KVIN VIRINOJ DE AMORO**, de Ihara saikaku, klasikulo de la japana erotika literaturo. Kvin ekzotikaj noveloj, kie la aŭtoro lerte intermiksas tragedion kun humuro, ĉirkaŭ kun satiro. Traduko de Miyamoto masao. 159 p., 42 samepokaj ilustraĵoj. Tolbind. 13,— gld.

Krome, eksterordinara eldono en la serio:

**LA DIA KOMEDIO**, de Dante Alighieri, mondliteratura verko bezonanta nenian prezenton. Traduko de Giovanni Peterlongo kun paralela itallingva originalo. Lukse bindita, 709-paĝa, kun unika kolekto de ilustraĵoj de Botticelli. 36,— gld.

Aperos baldaŭ pliaj gravaj titoloj

Ĉiuj mendeblaj rekte ĉe la libro-servo de U.E.A.

Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2, Nederlando